

# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago N°10 Oktobro, 2009

*Kara Leganto, fulmrapide dronis en historio de la homaro ankoraŭ unu monato kaj tio ĉi denove atentigis la redaktan skipon pri nia devo – preparigi la sekvantan n-ron de la bulteno, kiu dum multaj jaroj ekzistas kun la senŝanĝa titolo "SALUTON!". Estas kelkaj novaĵoj: plezuraj kaj malagrablaj. Oni devas konstati, ke baldaŭ forlasos nian redaktan teamon altestimata d-ro Puramo, kiu dum multaj jaroj kreis aspekton de nia bulteno pli alloga, forigis erarojn, elradiis lumon kaj (eĉ) sanigis nin! Post tri numeroj Li adiaŭos nin, restonte (mi esperas) anime kun ni. Pri pli ĝojaj okazintaĵoj vi legos sube. Ekzistas unu "neŭtrala" afero: novembre ESdŜ devas elekti novan estraron por la sekvanta 2-jara periodo. Bv prepari viajn proponojn por la oktobra kunveno. Koran dankon pro la kunlaboro. - La redakcio*

## Denove pri la UK'09

Walter Cebulski

La 94-a UK de E-o, okazinta en la tagoj 25-a de Julio ĝis la 1-an de Aŭgusto 2009 estis ne nur eksterordinara, sed ankaŭ jubilea. Ĝi okazis en la naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof okaze de lia 150-a naskiĝdatreveno kaj estis partoprenita de preskaŭ 2000 E-istoj el 63 landoj. La solena inaŭguro de la Kongreso okazis dimanĉe, la 26an de Julio en du partoj. Unue en la apuda gotika preejo. Sep pastroj partoprenantoj de la Kongreso celebris la Sanktan Meson en E-o. Dum la Meso predikis helpeskopo mons. Josef Hrdlička, kiu diris: "Esperanto heroldas ne nur filologian projekton, sed ĝi proponas multe pli: la spiritan vojon al proksimiĝo, amikeco kaj unueco. Ĝi kunigas multajn homojn el multaj nacioj kaj ĉiuj senprobleme povas interkompreniĝi."

Promenante tra Bjalistoko oni ne povis eviti lokojn kaj objektojn ligitajn kun la kreinto de E-o. La ligna verda dometo, en kiu naskiĝis L. Zamenhof, jam ne ekzistas. Oni konstruis tie novan brikon loĝdomon. Sur la muro de tiu ĉi domo pendas memortabulo kun dulingva teksto. Supre de la tabulo troviĝas murpentraĵo, kiu prezentas bjalistokajn E-aktivulojn. La itinero de E-o gvidis ĉiujn al gravaj E-objektoj: monumento honore al L. Zamenhof, iama reala gimnazio (nun – liceo), kie lernis juna Luĉjo, Centro de Ludoviko Zamenhof, en kiu oni povas rigardi ekspozicion, prezentantan Bjalistokon de la tempo de juneco de Ludoviko.

La vic-urbestro Aleksandr Sosna estis tre aktiva kiel prezidanto de LKK. Esperantaj flagetoj svingis en la urbo kune kun polaj kaj regionaj standardoj. Je la tagmezo oni povas aŭdi trompetsignalon, similan al la krakova.

Ĝin postsekvis la E-himno – ambaŭ estis venantaj de la urbodomo.

Kongresa programo abundis je diversaj artaj aranĝoj: koncertoj, teatraĵoj, artaj prezentaĵoj, okazintaj ne nur en la kongresejo, troviĝanta en Bjalistoka Politekniko, sed ankaŭ diversloke – en kafejoj, sur la urba placo, en la parkoj. La solena malfermo de la UK okazis la 26an de Julio en la granda tendo staranta antaŭ la ĉefa konstruaĵo de la Politekniko. Ĉe la prezidi-tablo estis sidantaj estraranoj de UEA kun prez. P. Daŝgupta, la vic-urbestro de Bjalistoko kaj aliaj gastoj kaj oficialuloj.

La sekvantaj tagoj estis plenaj de diversaj programeroj. Ĉiu povis elekti ion laŭ sia gusto. La artaj aranĝoj estis altnivelaj kaj bonege preparitaj. La kongresa merkredo estas kutime dediĉata al ekskursoj. Oni povis ekskursi al la regiono de Narev rivero, rivero Bug kaj al la lando de eŭropaj bizonoj. Sabatmatene en la granda tendo okazis la solena fermo de la UK. Sekvis lastaj salutvortoj, dankvortoj al la organizantoj kaj helpintoj kaj fine bjalistokanoj transdonis Esperantan flagon al gesamideanoj el Kubo, kie okazos UK en 2010. La loka gazetaro, radio kaj televido raportis pri la kongresaj tagoj. Nia samsocietano Leszek Kordylewski parolis kun ĵurnalistoj kaj, konante lian perfektan E-on kaj humoron, la intervjuo estis interesa. Ĝis la revido en Kubo!





## Gratulojn!

Ni tutkore salutas kaj gratulas nian sam-societanon d-ron Les Kordylewski okaze de 50-jara datreveno de lia esperantiĝo! Sanon kaj sukcesojn sur la Verda tereno!

Tutanime ni gratulas nian prezidinton Roberton de lia UNUA 50-jariĝo! Bonstaton al vi kaj via Esperanta familio!  
- *La Redakcio*

## Vizito de l'meksika samideano

Mi kun mia patro vojaĝis tra Ŝikago de la 14 ĝis 20a de Septembro. Ni vizitis multajn lokojn, inter ili: Addler Planetarium kaj Akvarion Shedd, tre interesaj lokoj. Poste ni vizitis la Milenio-parkon kaj la strukturon, nomitan "nubo" kore de la parko. Ni estis ankaŭ en la Ŝikaga Arta Instituto, tie ni gustumis tre altnivelajn artaĵojn.



La sekvantan tagon ni renkontiĝis kun d-ino Novak kaj s-ro Offutt. Ili amikeme koniĝis la belan urbon Ŝikagon. Mia patro eĉ interesiĝis lerni Esperanton, ĉar fakte li komprenis pli bone la verdan lingvon ol la anglan. La vetero estis tre bela bonŝance, ni tre ŝatis la transportiĝon kaj la bonan organizadon de la urbo. Ni esperas reveni venontjare ĉirkaŭ aprilo, espereble kun miaj fratoj.  
*Gustavo Adolfo Luna*

## Atentu, sociologoj!

SEG estas faka grupo de soci-sciencistoj, kiu volas fari esploron pri la bildo de UEA en Esperantujo. Pro tiu celo ni instalas enketon en interreto (iuj jam ricevis paperan enketilon en Bjalistoko). Ĝi estas respondebla en proksimume 20-30 minutoj. Ĉu vi pretas helpi pri la esplorado? Bonvolu plenigi la enketon en interreto. Ne necesas esti membro de UEA (ni aparte volas aŭdi opiniojn de ne-membroj) kaj ĝi ankaŭ ne varbas por UEA. La opinioj kaj personaj informoj, kiujn vi indikos estas uzataj nur por esplorado kaj kaj rezultoj estas uzataj nur en maniero, kiu ne ebligas rekonii individuajn respondinton. Vizitu <http://enketo.shortURL.com>. Dankon. La enketon administras Zbigniew Galor kaj Jukka Pietiläinen. Kopiu tiun ĉi mesaĝon kaj sendu ĝin al viaj esperantaj amikoj kaj konatuloj.

## Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago  
p/a Viktor' Pajuk  
8228 O'Connor Dr., # 2F  
River Grove, IL 60171  
(773) 344-2276  
[www.esperanto-chicago.org/](http://www.esperanto-chicago.org/)

## Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk  
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong  
Eksprezidanto – Roberto Stalzer  
Sekretario – Gertrude Novak, MD  
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; \$40 jare;  
Familia membro : \$30, Regula: \$20  
Studenta aŭ pensiula: \$10.

Gifts are welcome also.  
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,  
Charles Gunn, 828 S. Ada St,  
Chicago IL 60607

## KUNSIDO

**okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:**

Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.  
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

## Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

27an de Oktobro – Davido Kirschbaum gvidas nin tra la historio de Eŭropo

24an de Novembro – elekto de nova gvidantaro. Viktoro rakontos pri sia vojaĝo al Ukrainio

13an de Decembro – Zamenhofa tago en Evanstono

